


Bulgaria ESPERANTISTO



6

1969

ENHAVO

	Paĝo
N. Aleksiev. „Ja kiu falas por la libero — mortas neniam!“	1
* * * Fondita Ĉeĥa E-Asocio.	2
M. Ŝekerĝiev. Maria	3
D-ro B. Nedkov. Bulgara Esperanto—Muzeo	6
B. Leonov, K. Vălev. La IX Festivalo de BEJ	7
* * * La premioj de la Festivalo	10
Prokopi Dragolov. Rememoro pri la esperantisto Mladen Blaĵev	11
J. Atanasov. Andrej Jordanov Nenov	12
M. Diĉeva, d-ro Z. B., M. Coneva, M. Miteva. Organiza vivo	13
K. Velkov. Letero el Kiev	15
L. Paspaleeva. La dorssaketo de Branko	16
* * * Nia poŝto. Esperanto-geedziĝoj. Nova Internacia E-ripozejo. Deziras korespondi.	

Sur la kovrilpaĝo:

Parto el la pli ol mil partoprenintoj en la IX Festivalo de BEJ en Haskovo antaŭ la Kulturdomo „Zarja“

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2 Eindhoven.

RUMANIO: Miĥail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Televidenija D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva, M—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



„JA KIU FALAS POR LA LIBERO — MORTAS NENIAM!“

La dua de junio estas la tradicia tago, kiam nia popolo amase esprimas sian estimon kaj amon al tiuj herooj, kiuj falis en la batalo kontraŭ la osmana sklavjugo, la kapitalismo kaj faŝismo. Apud iliajn monumentojn kaj la lokojn, kie ili pereis, venas multnombraj laboruloj. La senmortaj sonoj de la amata kanto de Hristo Botev „Vivas li, vivas“ aŭdiĝas tra kampoj kaj montaroj, glorigante la grandecon de la falintaj herooj.

Ĉi-jare ni festas la Tagon de Botev kaj la pereintoj en la batalo kontraŭ la faŝismo, la kapitalismo kaj en la Patrolanda Milito kontraŭ la hitleranaj hordoj en la antaŭvespero de la proksimiĝanta 25-jara jubileo de la Socialisma Revolucio en nia lando.

Kompare kun la jarcentoj de sklaveco en la longa kaj pezega historio de nia popolo, la lastaj 25 jaroj de socialisma konstruado estas treege mallonga periodo. Sed laŭ la atingaĵoj, realigitaj dum tiu periodo en la tuta lando, ĝi estas inda por la memoro kaj la plej noblaj revoj de la pereintaj fidelaj idoj de Bulgario.

Ekspluatita dum jarcentoj, nun nia Patrolando estas en la unuaj vicoj de la batalantoj por paco, socia justeco kaj homa progreso. Nur dum 25 jaroj la jarcenta mizero estis venkita kaj Bulgario ekviciĝis inter la industriigitaj landoj. Nia popolo jam estas inter la plej kulturaj kaj instruitaj popoloj en la mondo. Jen la mallonga resumo de nia evoluado sub la reĝimo de la popola demokratio.

Amo al la idealoj de l'socialismo, unueco inter la popolo kaj la Partio, amikeco kun Sovetunio kaj la popoloj el la socialisma landaro — jen la vivdonaj fontoj de niaj nunaj kaj estontaj venkoj en ĉiuj sferoj de la vivo. Jen kiel ni plenigas per nova enhavo la popolan estimon al la grandega afero de la herooj — mortintaj kaj vivaj. Ilia faro estas senmorta kaj restos en la jarcentoj de l' estonteco.

Kaj kiom agrable estas rememorigi, ke inter la sennombra gvardio de batalantoj por la popola libero kaj por la konstruado de la nova vivo en nia lando, troviĝas centoj kaj miloj da patriotoj-esperantistoj! Pri multaj el ili ni jam publikigis skizojn en la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ dum la lastaj 20 jaroj. Pri multaj ni faros tion porestante. Neniam ni forgesos ilian ekzemplon, ĉar kiu falas en la batalo por libereco, mortas neniam!

FONDITA ĈEĤA E-ASOCIO

En Brno kunvenis la 29-an kaj 30-an de marto 1969 kvarcent esperantistoj kaj partoprenis konstituan kongreson de Ĉeĥa E-Asocio. Salutparolojn prezentis oficialaj gastoj, inter kiuj reprezentanto de Ĉeĥa Ministerio de Kulturo, la direktoro de la Kleriga Instituto en Prago, reprezentanto de la slovakaj esperantistoj k. a.

La kongreso aprobis Statuton de ĈEA kaj elektis CK kun prezidanto Josef Vitek.

Oficiala organo de la nova organizaĵo farigis la ĝisnuna informilo „Starto“.

Unuanime estis akceptita Program-deklaro de Ĉeĥa E-Asocio, en kiu kiel ĉefa tasko estas montrita la disvastigado de la Internacia Lingvo kiel rimedo de interkompreniĝo kaj internacia kunlaboro kaj plilarĝigo de la kontaktoj kun eksterlandaj E-organizaĵoj kaj institucioj. Ĉe la Asocio funkcias MEM-sekcio, junulara, fervojista, instruista, teknikista, medicina, sekcio de KELI kaj de IKUE.

FONDITA ANKAŬ SLOVAKA E-ASOCIO

La 9—11-an de majo okazis konstitua kongreso de Slovaka E-Asocio. Pliajn informojn pri tio ni ne havas.

Al la du frataj E-Asocioj ni bondeziras brilajn sukcesojn sur la kampo de internacia paco kaj kunlaboro pere de Esperanto!

Por la E-ekspozicio, aranĝota septembre en Moskva Universitato, estas bezonataj diverslandaj bildkartoj, turismaj prospektoj en Esperanto, diverslingvaj E-lernolibroj kaj vortaroj, revuoj kaj aliaj interesaj kaj belaspektaj esperantaĵoj. Post la fermo de la ekspozicio la eksponaĵoj estos laŭpostule resendotaj.

La esperantistoj tutmonde estas petataj subteni tiun ĉi gravan iniciaton.

Adreso: Moskvo V-311, ab. jaŝĉik 739, „Esperanto“.

REEĤO EL GDR

(Eltiraĵo el letero)

Al la Distrikta Komitato por Defendo de la Paco kaj al la Distrikta Komitato de BEA, p. k. 60, Ŝumen, Bulgario

Karaj geamikoj,

ni kun granda intereso legis vian Alvokon al defendo de l' heroa vjetnama popolo. Ni ne nur per vortoj konsentas kun vi, sed depost la fondiĝo de nia grupo (1965) persiste laboras por paco kaj popolamikeco.

Pasintjare dum la balotoj ni persvadis 35 civitanojn doni unufoje senpagan sangon por kuracado de vunditaj vjetnamoj. Ankaŭ dum la tago de plebiscito por nova socialisma konstitucio de GDR ni konvinkis 2186 balotantojn subskribi proteston kontraŭ la malhoma usona milito en Vjetnamio kaj kontraŭ la malhonesto murdigo de Martin Luther King. Dum la tuta tago 15 aktivuloj-esperantistoj, grandparte junuloj, agitis inter la neesperantista publiko.

Ni opinias, ke nia batalo nur tiam havos sukceson, kiam ni interligiĝos en komuna porpaca batalo kun aliaj organizaĵoj, kiuj luktas kontraŭ la imperiismo kaj agreso. La esperantistaro ne devas memizoliĝi de la largaj neesperantistaj amasoj, kiuj persiste partoprenas la liberigan movadon por paco kaj progreso.

Vivu la internacia amikeco kaj interkompreniĝo per Esperanto!

Esperanto-grupo „Popolamikeco“ Kurt Heeg, 362 Werdau, GDR, Ziegelstr. 20

Vera esperantisto ne povas vivi sen „Bulgara Esperantisto“, nia efika E-batalilo! Abonu ĝin! Disvastigu ĝin!



— Saŝo, la homoj similas riverojn, ĉu ne? — demandis min Maria, observante la preterpasantan montaran rivereton. Ŝi silentis momenton kaj daŭrigis: — Nu, aŭskultu, kiel dolĉe mormuras la akvo, kvazaŭ rakontas fabelon.

Mi ĵetis rapidan rigardon al la rivereto, vikle saltanta de ŝtono al ŝtono, formante dekojn da etaj akvofaloj. Sed mi ne respondis tuj. Ŝajnis al mi, ke Maria fantazias, ke ŝia komparo estas stranga kaj neperceptebla. Tamen ne volante kontraŭstari ŝin, mi flustris:

— Jes, kara, la homoj similas riverojn.

Kiam la vesperon mi enlitigis, la impresoj de la belega ekskurso longe okupis mian atenton. Maria, mia revo, estis tiel milda kaj babilema kun mi! Malgraŭ tio, mi ankoraŭ dubis, ĉu ŝi vere amas min. Poste la penso pri la riveroj ree aperis antaŭ mi. Mi komencis riproĉi min, ke hodiaŭ mi ne estis sincera, ke nur pro komplezo mi respondis: „Jes, Maria, la homoj similas riverojn“. Kia simileco fakte povus ekzisti inter ili?

Kun Maria mi interkonatiĝis antaŭ ses monatoj. Ni vagis kune en la montaroj, vizitadis teatrojn, koncertojn, amuzvesperojn, sed fakte mi ankoraŭ ne konas ŝin bone. Mi komprenis nur, ke ŝi estas mirinda estaĵo. Ŝi ŝatis muzikon, poezion, pentrarton, serĉis kaj ĝuis la belecon tie, kie ni ordinare ne rimarkas ĝin. Tiu ĉi virino, juna kaj bonkora, estis elkreskinta en montara urbeto. La daŭra kontakto kun la naturo donis al ŝi tre senteman animon. Ofte ŝi ascendis montopintojn kaj de ili renkontis la sunon. Pro tio oni nomis ŝin aglino. Ŝi ŝatis la florojn, la bestojn, la infanojn. Kaptinte kokcinejon, ŝi ĝuis ĝiajn nigrajn makuletojn

kaj kiam satiĝis, lasis ĝin flugi for kun bondeziroj. En ŝia animo estis io primitiva kaj alloga. En kiu senco ŝi povus pravi pri la riveroj?

La morgaŭan tagon mi telefonis al Maria kaj ni interkonsentis pri rendevuo.

— Ĉu ni iros danci ĉi-vespere? — ŝi demandis ĉe la renkonto.

— Ne, Maria, ĉi-vespere ni filozofios. Mi deziras, ke vi klarigu al mi vian komparon pri la riveroj — mi respondis, kiam ni sidiĝis sur benko en la parko.

— Bone, mi ankaŭ ŝatas la filozofiajn temojn — konsentis tuj Maria.

Poste, preninte mian manon, ŝi eksilentis, kvazaŭ volis koncentri sian atenton, kaj komencis.

— Unue, Saŝo, mi parolos pri la naturo, pri ĝia beleco, harmonio, dinamiko, ritmo. Tiel vi komprenos min pli facile. La okuloj, la animo kaj la konscio de la homoj perceptas la belecon ĉie. La najtingalaj triloj ĝojigas nin, la ĉielarko karesas nian estetikan senton, la belaj, ofte mirindaj formoj de floroj aŭ bestoj igas nin admiri kaj interjekcii. Ĉu la pufiĝanta pavo konscias la belecon de siaj imponaj plumoj aŭ la skarlataj kaj violbluaj koraloj, marsteloj kaj strikoloraj fiŝoj scias, kian emociion ili naskos en la animo de la subakvaj esplorantoj?

Ni diru, ke vi estas kolektanto de papilioj. Kio igis vin kolekti ĝuste papiliojn? Sendube, via intima ideo estis ĝui ilian belecon, ĝui la malavare disĵetitajn diversformajn, molajn, pitoreskajn kolormakulojn. Ĉu vi ne konsentus kun mi, ke la reto de la araneo estas same delikata belaĵo? Mi ne dubas, ke dum frostaj vintraj frumatenoj vi ofte ĝuis la glaciflorojn mistere aperintajn sur viaj fenestrovitroj.

Ne volante interrompi ŝiajn pensojn, mi silentis. Mia menso soife ensorbis ĉiun vorton. Kion mi povus kontraŭdiri? Maria daŭrigis.

— Vasta kaj ampleksa estas la diapazono de la naturbeleco. La kuracistoj longe esploris la homan korpon kaj admiris tiun mirindan maŝinon. Ne, mi ne rajtas diri maŝinon. Ĉu la belstatura torso de Venusa de Milo aŭ de similaj belegaj virinoj estas maŝino?! La homa korpo estas vera belaĵo kaj mirindaĵo.

Sed la naturbeleco konsistas ne nur el koloroj kaj formoj. Ĝia karakteriza indiko estas ankaŭ la dinamiko. Tiun dinamikon oni sentas en la akvofaloj kun la miliardoj da vaporigantaj akvogutoj, en la senĉese vagantaj nuboj, en la ŝtormoj kaj fulmotondroj, en la erupcioj de la vulkanoj, en la maturiĝo de la vino, en la atako de la mikroboj. La ventoj blovas, la steloj cirkulas, la atomoj bolas. Ĉie estas dinamiko. Sen ĝi ekregus morto.

— Rakontu ion pri la harmonio, Maria — mi interrompis ŝin.

Tute fascinite, ĉi-vespere mi sentis, kiel pli kaj pli Maria kreskas spirite antaŭ miaj okuloj. Same verve kaj emociplene ŝi daŭrigis:

— Observante la naturvivon, oni facile konstatas, ke en ĝiaj aperaĵoj ekzistas ankaŭ harmonio. Nokte ni observas la stelojn senkolizie flugantajn en la kosmo; haltinte antaŭ la formikejo, mi rigardas, kiel, ne malhelpante unu la alian, la formikoj laboras laŭ neskribitaj leĝoj. La kristaloj kristaliĝas bele kaj simetrie, la abeloj arkitektmajs-tre konstruas sian ĉelaron, ĉiu muziknoto havas sian ĝuste difinitan lokon en la diversaj gamoj, melodioj kaj akordoj. Leĝoj, naturaj leĝoj, simplaj kaj saĝaj.

Kaj la ritmo? La ventoj, kreitaj pro la influo de la suno sur la tero, la tajdo, kiu altiĝas kaj malaltiĝas sub la influo de la luno, la tagoj, sekvataj de la noktoj — ĉiuj ĉi estas subigitaj

al la leĝo de la ritmo. Ritmo estas en la poezio, ritmo estas en la muziko, ritme sin movas la pendolo, ritme spiras ni ĉiuj. En nia ĉiutaga vivo ni ĉiam devas kompari nin kun la naturo, ĉar ni estas eroj de ĝi. Ĉiu homo devas porti en si la belecon, la dinamikon, la harmonion kaj la ritmon de la naturo.

— Belege, belege! — mi interjekciis. En la sama tempo mi pensis: „Ĉu tiu ĉi virino kun simila tenera animo estas tiu sama inĝenierino, kiu kaptas kaj bridas riverojn en baraĵoj, estras laboristojn kaj sentas sin egalrajta kaj egalpova kun la viroj?“

— Tamen ĉu vi kredas, ke la civilizacio tiom multe progresis, por ke ni povu diri, ke inter la homoj regas harmonio? Ne! Ankoraŭ milionoj da homoj sur nia terglobo vivas en malklereco kaj mizero, mortas pro malsato kaj pro teruraj malsanoj. Aliflanke, la homaro malproksimiĝis sufiĉe multe de la naturo, kaj pro tiu sia peko ricevas punon en formo de degenero kaj anticipa morto.

— Sed, Maria, la naturleĝoj ne estas la samaj, kiuj regas en la homa socio — mi diris.

— Oni ja ne povas ĝuste imiti la naturleĝojn, sed oni povas efektive krei kondiĉojn egale necesaj por ĉiuj homoj, por ke ili vivu laŭnature kaj feliĉe.

Senpacience mi atendis la momenton, kiam ŝi komencos klarigi sian originalan penson pri la riveroj. Post eta paŭzo ŝi komencis:

— Mia hieraŭa eldiro pri la riveroj estas bazita sur la sama koncepto. Nia vivo, Saŝo, estas multjara vojaĝo. Vojaĝo simila al la vojaĝo de la riveroj, trankvila aŭ plena de dinamiko, utila aŭ senkolora, vana. Tiurilate ĉiu homa vivo estas unu rivero. Ekzistas homoj senvolaj kaj apatiaj, kiuj similas trankvilajn riverojn, kun kanoj kaj akvolilioj. Ofte kelkaj arbotrunkoj estas fa-



KANTO PRI LA NAŬA FESTIVALO

de Nikola Uzunov

En ĉi tiun belan halon
venis ni el ĉiu rand'!
Venis ni al Festivalo
el la tuta Patroland'!

Festivalo, Festivalo,
nia Naŭa Festival'!
Festivalo, Festivalo,
Esperanta Festival'!

Nia kara Esperanto
nin kolektis tie ĉi!
Ho, kantistoj, deklamantoj,
la talenton montru vi!

Dum la gaja Festivalo
dancas, kantas ĝoje ni!
Same en la pachtalo
estas la unuaj ni!

ODO

de Rajna St. Kirova

Kun streĉa kaj paca
laboro
kaj granda, senlaca
fervoro
jam didekkvin jarojn
postenas
kaj alte standardon
vi tenas
de l' sankta batalo
por paco
kaj kreas, konstruas
sen laco
uzinojn gigantajn,
centralojn,
ĝardenojn florantajn,
kanalojn.

Vi streĉas muskolojn
intense,
vi streĉas la volon
kaj menson
por vivo pli riĉa
kaj bela,
por vivo feliĉa
kaj hela.
Vera hero' de
l' epoko
kaj ĝia konscio
kaj voko,
simbol' de impet'
kaj persisto,
vi —
komunisto!

Noto de la Redakcio. La versaĵoj „Kanto pri la Naŭa Festivalo“ kaj „Odo“ ricevis la II-an premion en la Literatura Konkurso de la Naŭa Festivalo de BEJ.

lintaj en ilia akvo, tamen tiuj riveroj ne protestas, ne forpuŝas kaj ne forportas la trunkojn, sed rezigne kaj kviete preterfluas ilin. Aliaj homoj, en kiuj regas pasioj kaj malvirtoj, similas riverojn, kiuj eliĝas el siaj litoj, detruas bordojn, domojn, mortigas bestojn, faras sulkojn sur la ebenaĵoj. Ĉu la sulkoj sub la okuloj kaj ĉe la anguloj de la lipoj kaj en la animo mem ne estas ofte rezultoj de furiozintaj pasioj kaj malvirtoj? Ekzistas ankaŭ homoj similantaj nek la detruantajn riverojn, nek la kvietajn. Ili estas entuziasmoplenaj, viglaj, iliaj sentoj kaj intelekto kontrolas sin reciproke. Ili sentas en si la

kanton de la vivo, kanton de la naturo. Ili alportas ĝojon, plezuron, feliĉon. Ili similas printempajn torentojn. . . La riveroj trafluas montojn kaj kampojn, batalas kontraŭ rokoj, akceptas dekojn da riverbranĉoj kaj fine enfluas marojn kaj oceanojn. Ilia akvo, komencinta sian vojon de la fonto, ne ekzistas plu. Ĝin sekvas nova. En sia vivo la homoj laboras, batalas, ĝojas, amas kaj malamas, kaj lacaj kaj maljunaj atingas la morton.

Mi ĉirkaŭprenis ŝin kaj arde kisis ŝin. Ŝi ne protestis. Estis jam malfrue. Tiu vespero kunigis nin por ĉiam kaj ni ekfluis kiel du riveroj al la oceano.

Noto de la Redakcio. La rakonto „Maria“ gajnis la III-an premion en la Literatura Konkurso de la 53-a UK de Esperanto en Madrid (1968).



La unua de aprilo 1963 j. estas la naskiĝdato de Bulgara Esperanto-Muzeo. Komencinte per kolektado de E-libroj kaj gazetoj, donacataj de apartaj esperantistoj, ĝis nun la muzeo kolektis pli ol 950 librojn. El ili 500 ĝi transdonis al la Nacia Biblioteko en Sofio kun la interco fondi tie E-fakon. Kolektitaj estas ankaŭ 430 diversaj titoloj de E-gazetoj, revuoj kaj bultenoj.

Ĝis nun estas registritaj 53 donacintoj, kiuj vere komprenis la noblan devon kaj oferis senegoisme ekzemplerojn el siaj privataj bibliotekoj. Plej grava akiro estis la pli granda parto el la biblioteko de la forpasinta fama bulgara Esperanto-veterano Ivan Maralampiev Krestanov.

Krom la Esperantaj libroj kaj gazetoj, en lia arkivo troviĝis multe da dokumentoj el la unuaj jaroj de la Esperanto-Movado en nia lando. En la Muzeon eniris ankaŭ 8 liaj grandaj albumoj de ilustritaj poŝtkartoj el la komenco de nia jarcento. Menciindaj estas ankaŭ la 14 Zamenhofaj leteroj, ricevita de li kaj transdonita por konservado en la Nacia Biblioteko; kopiojn de ili la Muzeo posedas. La privata korespondado de Krestanov estas tre ampleksa, kaj eble estonte interesusuloj trastudos ĝin.

Aliaj seriozaj donacintoj de libroj, gazetoj, dokumentoj, portretoj k. a. estas: Asen Grigorov, Evstati Cifudov, Simeon N. Petkov, Atanas D. Atanasov — Ada, Nikola Nikolov, Ljubomir Leviĉarov. La Muzeon eniris ankaŭ la arkivo de Atanas D. Atanasov — Agro, la korespondaĵo de Dojĉo Kolev kaj diversaj aŭtobiografioj. Bulgara E-Asocio transdonis la dosierojn de 80 esperantistoj.

Bulgara Esperanto-Muzeo kontaktas kun la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, la Biblioteko de UEA, la E-Muzeo en Szeged — Hungario kaj la Hispana E-Muzeo. Kun la lastaj du nia Muzeo interŝanĝas vigle gazetojn.

Laŭ nia interkonsento la Nacia Biblioteko faros katalogon al la 500 de ni donacitaj E-libroj kaj al 150 E-libroj, kiujn ĝi posedas de antaŭe. Tiamaniere la esperantistoj povos utiligi la E-riĉaĵon de nia Nacia Biblioteko. Ni esperas, ke la katalogo estos preta ĝis la fino de la kuranta jaro.

Unu el la celoj de nia E-Muzeo estas organizi ekspoziciojn de plej diversaj esperantaĵoj. Ĝis nun estis aranĝitaj ses ekspozicioj. Plej sukcesaj estis la ekspozicioj en la Nacia Biblioteko en Sofio kaj dum la 37 bulgara E-Kongreso en Varna (1968).

La Muzeon subtenis finance per modestaj sumoj BEA, E-societo „M. Gorkij“ — Sofio kaj Bulgara Esperantista Kooperativo.

La ĝis nun farita muzea laboro ne kontentigas. Ĝi povus esti multoble pli efika, se la Muzeo posedus propran ejon, kie ĝi plej bone ordigus sian kolekton kaj povus servi pli komplete al la esperantistoj. La nuna stato tute ne konvenas al la E-Movado en nia lando.

Agi tiurilate — helpi por havigo deejo kaj subteni ĉiufanke la muzean aferon, unualoke per donacado de E-libroj, dokumentoj, fotoj (sed provizore — pro manko de loko — ne gazetoj kaj ĵurnaloj), estas sankta devo de ĉiu bulgara esperantisto.

*D-ro Boris Nedkov,
fondinto de BEM*

Gesperantistoj, plej aktive partoprenu la konstruadon de la socialismo en uia Patrolando! Honore al la 25-jara Jubileo de la Libero — per inda kontribuo!



NIA JUNU- LARO

La 5 de aprilo — suna fruprintempa tago. La vagonaroj kaj aŭtobusoj al Haskovo estas plenplenaj de gajaj gejunuloj, kiuj kantas kaj parolas en Esperanto. La belega halo de la moderna Kulturdomo „Zarja“ ne povas enteni la pli ol 1100 junajn geesperantistojn, venintajn el ĉiuj anguloj de la libera Patrolando.

16a horo. Solena inaŭguro de la IX Festivalo de Bulgara Esperanto-Junularo (BEJ). Ĉe la tribuno — la juna inĝeniero Nikola Uzunov, sekretario de la Organiza Komitato de l' Festivalo kaj vicprezidanto de BEJ. Li donas la parolon al k-do Dinko Atanasov — sekretario de la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio kaj prezidanto de la Organiza Komitato de la Festivalo. K-do Atanasov Esperantlingve salutas varme la festivalanojn kaj bondeziras al ĉiuj bonajn sukcesojn en ilia festivala prezentigo, en la lernado kaj generale en ilia laboro kaj batalo por la feliĉo de nia kara patrolando, por firmigo de l' amikeco kaj la paco inter la popoloj.

Sekvas salutparoloj de: inĝ. Simeon D. Simeonov — vicprezidanto de BEA, inĝ. Petro Todorov — prezidanto de BEJ, D. Nikolov — prezidanto de la Urba Soveto en Haskovo, G. Andreev — sekretario de UK de Komsomolo, inĝ. Bojidar Leonov — prezidanto de STELO, G. Idakiev — prezidanto de la Distrikta Komitato de BEA. Salutis la festivalanojn ankaŭ la fremdlandaj gastoj — el Sovetunio (urbo Taŝkent), Francio, Jugoslavio, Kenio, Japanio.

Post la salutparoloj okazis riĉega koncerto, plenumita de haskovanoj.

LA IX FESTIVALO DE BEJ

5—7. IV. 1969 — Haskovo


Jam venis la krepusko de la printempa vespero. En majestaj kolonoj la festivalanoj sin direktis laŭ la ĉefstrato de la urbo al la monumento de prof. Asen Zlatarov, patrono de la loka E-Societo. Ĉi tie oni metis florkronon. Poste — antaŭ la monumento de la pereintoj por la popola libero.

Estis inaŭgurita ankaŭ ekspozicio okaze de la 65-a jareco de la loka E-Societo kaj de la IX Festivalo.

La sekvan tagon komenciĝis la nobla konkurado sur du scenejoj: junuloj kaj studentoj — en Kulturdomo „Zarja“ (jurio Kunĉo Vălev, inĝ. Petro Todorov, la artisto Duparinov k. a.), kaj junpioniroj — en la Domo de la Popola Armeo (jurio Stojan Kostadinov, Bojidar Leonov, Duparinova). Tra ambaŭ scenejoj pasis centoj da gejunuloj, gestudentoj, gelernantoj, junpioniroj. Sian majstrecon montris kanthoroj kaj dancgrupoj, orkestroj el modernaj aŭ popolaj instrumentoj, unuopaj estradaj ludantoj kaj kantantoj, recitantoj, eĉ dramaktoroj. Kiel potenca rivero fluis la juneco de nia popolo, la juneco de

La prezidiumo ĉe la inaŭguro





la bulgara E-Movado: rivero de buntaj koloroj, freŝvoĉaj sonoj, graciaj movoj, ĉarma junula dinamiko. La publiko eĉ sekundon ne restis apatia, ĝi estis ravita. Tiun ravitecon bonege esprimis nia gasto el Japanio, s-ano Tacuo Huĝimoto:

— Mi neniam vidis kolektita sur unu kaj sama loko tiom multe da beleco... Mi neniam supozis, ke pli ol mil gejunuloj povas kolektigi sur unu kaj sama loko kaj danci, kanti, deklami en Esperanto. Mi kvazaŭ vidas belegan, ĉarman sonĝon...

Kaj s-ano Huĝimoto fotis, fotis konstante kaj registris ĉion per sia portebla magnetofono. Poste, en Japanio, li rakontos pri nia Festivalo, pri nia E-junularo dokumentite — jen la fotoj, jen la sonbendo!

En la programo de ĉiu kolektivo kaj grupo, en la eroj de ĉiu individua plenumanto, en la aero mem de la impona halo ŝprucis arda junula entuziasmo, amo al la paco, al la interpopola amikeco. Sed super ĉio estis la patriotisma spirito, la profunda danko al la Popola Registaro kaj la amata Bulgara Komunista Partio pro la libera, feliĉa vivo de nia popolo, pro la ankoraŭ pli feliĉa perspektivo antaŭ ni.

La vesperon okazis la tradicia festivala balo kaj la konkurso „Rozo de la Festivalo“. La konkurson gajnis Lalka Nikolova, lernantino el Karlovo.

La sekvan tagon oni kun granda intereso aŭskultis la konkuradon de la junaj oratoroj. La Oratoran konkurson (kun ĵurio Kunĉo Vălev, Asen Grigorov kaj Nikola Pilev) partoprenis 6 gek-doĵ, inter kiuj kelkaj tre bonaj.

Unuafoje dum siaj festivaloj BEJ iniciatis Literaturan Konkurson. Laŭ-



1. La grupo de arta recitado — Haskovo
2. La grupo de arta recitado — Karlovo
3. La studenta voĉestrada trupo — Sviŝtov



dinde! La ĵurio (A. Grigorov, K. Vâlev kaj N. Pilev) traktis entute 15 verkojn (8 versaĵojn, 6 prozaĵojn kaj 1 teatraĵeton) de 11 gejunuloj. Inter ili estas sendubaj kapabluloj, kiuj obstine devas perfektigadi sin ĝis plena disfloro. Tre bonefika aranĝo, la Literatura Konkurso devas fariĝi konstanta ero de ĉiuj estontaj festivaloj de BEJ.



Kaj jen — venis la fino! Unu post alia sur la scenejon estis alvokitaj la multnombraj premiitoj. Enmanigo de memordonacoj, sinceraj gratuloj, tondraj aplaŭdoj, arda entuziasmo. . .

La IX Festivalo de BEJ brile sukcesis. Ĝi estis unu el la plej bone organizitaj kaj altnivelaj festivaloj ĝis nun. Tion, sendube, oni ŝuldas plejparte al la obstina kaj prudenta agado de la Organiza Komitato, al la kunigo de l' fortoj de ĉiuj lokaj esperantistoj, reprezentitaj de E-societo „Asen Zlatarov“ kaj la Distrikta Komitato de BEA, al la favora helpo de la Popola Soveto kaj la aliaj organizaĵoj en Haskovo kaj al la ĉiam pli kreskantaj spertoj de la bulgara E-junularo kaj ĝia gvida tutlanda estraro.

Ni kredas, ke la estontaj festivaloj de BEJ estos ĉiam pli kaj pli bone organizitaj kaj la nivelo de ĉiuj eroj — pli kaj pli alta. Plej decidaj kondiĉoj por tio estas: ricevi kaj prudente utiligi la helpon de la loka socia kaj kultura aktivularo kaj, due, komenci sufiĉe frue (ekde la aŭtuno) prepari sin — kaj organizantoj de la festivalo, kaj partoprenantoj en la festivalaj programoj.

B. Leonov, K. Vâlev

1. Junpionira danctrupo el v. Ĵitnica
2. Junpionira kantgrupo el Dimitrovgrad
3. Junpionira danctrupo el urbo Marica



LA PREMIOJ DE LA FESTIVALO

I. ĜENERALA KLASADO

- I premio: Haskovo
- II premio: Karlovo — Sopot
- III premio: Smoljan

Specialaj premioj

1. Premio de la Urba Soveto de Haskovo por plej bona programo, dediĉita al la 25-jara Jubileo de la Libero: Smoljan.

2. Premio de la Urba Komitato de Komso-molo en Haskovo por plej idea junulara pro-gramo: Sviŝtov.

II. KLASADO DE JUNULOJ KAJ STUDENTOJ

A. Kolektivaj premioj

Recitado

- I premio: Haskovo
- Karlovo — Sopot

- II premio: Smoljan

Instiga premio per Jambol

Voĉestradaj trupoj

- II premio: Sviŝtov

- III premio: Karlovo — Sopot

Popolkantado

- I premio: Smoljan

- III premio: Haskovo

Estradaj orkestroj

Haskovo

Dancgrupoj

- I premio: Sviŝtov

- III premio: Madan

Teatraj trupoj

- I premio: Stara Zagora

- III premio: Karlovo — Sopot

Instiga premio pri filmo — al Sludenta E-Societo „Vela Peeva“ — Sofio.

Noto: Karlovo kaj VMZ Sopot prezentis sin per komuna programo.

B. Individuaj premioj

Deklamado

- I premio: Rosica Pavlova — Vraca

- II premio: Stefan Dimitrov — Sofio

Instigaj premioj al:

Lasto Nikov — Sofio

Bojka Batalaska — Sofio

Maria Raškova — Karlovo — Sopot

Dimo Krlev — Jambol

Kantado

- I premio: Marina Miteva — Haskovo

- II premio: Kina Merĝanova kaj Kina Bo-
ĉeva — Smoljan

Instrumentoj

- I premio: Vâljo Vâlev, akordiono — Tol-
buhin

- II premio: Z. Peevski, sakfajfilo — Tolbuhin

- III premio: Slavi Ĉenkov, akordiono — Kar-
lovo—Sopot

Belarta gimnastiko

Instiga premio al Liljana Minĉeva—Popovo

III. KLASADO DE JUNPIONIROJ

A. Kolektivaj premioj

Recitado

- I premio: Haskovo

- II premio: Tolbuhin

Kanĥoroj

- I premio: Dimitrovgrad

- II premio: Stara Zagora

- III premio: v. Smolnica, distr. Tolbuhin

Popolkantoj

- I premio: Tolbuhin

Orkestroj

- I premio: Stara Zagora

Dancgrupoj

- I premio: v. Ĵitnica, distr. Tolbuhin

- II premio: Dimitrovgrad

- III premio: urbo Marica

Teatraj

- II premio: Harmanli

B. Individuaj premioj:

Deklamado

- I premio: Emilia Nikolova — Stara Zagora

- II premio: Georgi Pilkov — Tolbuhin

- III premio: Nataŝa Vâlĉeva — Harmanli

Instiga premio al la malgranda Borjanka
Kisjova — Trojan

Kantado

- I premio: Stojanka Atanasova kaj Anton
Borisov — Karlovo—Sopot

- II premio: Dimitriĉka Dimitrova — Tervel

Popolkantoj

- I premio: Plamen Conev kaj Liljana Saran-
deva — Tolbuhin

- II premio: Janka Georgieva — Tolbuhin

- III premio: Ivan Kotev — Tolbuhin

IV. ORATORA KONKURSO

- I premio: Georgi Ĝârbaĉev — Jambol

- II premio: Stefan Pavlov — Smoljan

- III premio: Marie-Hélène Bourdier — Sviŝ-
tov — Francio

V. LITERATURA KONKURSO

Poezio

- I premio: ne aljuĝita

- II premio: Rajna Stoeva Kirova — lernan-
tino de 9 klaso Jambol (pro la versaĵo „Odo“)
kaj Nikola Uzunov — Haskovo (pro „Kanto
pri la Naŭa Festivalo“)

- III premio: D. Dimov — Razgrad (pro la
versaĵo „La mondo nin vokas“)

Kuraĝigaj premioj: Marie-Hélène Bour-
dier — Francio (pro la versaĵo „Morgaŭ“) kaj
Danĉo Stefanov Danĉev — Plovdiv (pro la
poemo „Esperanto estas kanto“)

Prozo

- I premio: Dimitr Ĵdrakov — studento en
Sofio (rakonto „Feliĉo“)

- II premio: D. Dimov — Razgrad (pro la
teatraĵeto „La vojo“)

- III premio: Kost. V. Stefanova — lernantino
8 klaso, Jambol (miniature „La koro de Ngo
lumas“).





REMEMORO PRI LA ESPERANTISTO MLADEN BLAĴEV

Mladen Blaĵev naskiĝis je la 14 de junio 1914 en v. Steĵerovo, distrikto de Pleven. Malriĉa estis lia familio, kaj li jam malgranda ekkonis la pezan vivon, la mizeron. Tial li eniris la kontraŭfaŝisman movadon tre juna. En la gimnazio de Sviŝtov Mladen estis unu el la plej aktivaj kaj entuziasmaj disvastigantoj de l'afero de la Bulgara Komunista Partio kiel membro de RMS (Laborista Junulara Unuiĝo). Tage li lernis, vizitis lernantkunvenojn, ofte prelegis antaŭ ili kaj varbis amase adeptojn de RMS. Nokte li disvastigis alvokojn, skribis kaŝe sloganojn. En la gimnazio li fariĝis ankaŭ esperantisto. Sed la reakciuloj lin observis. Pro lia sindona progresema agado li estis eksigita de la gimnazio.

Reveninte en sian naskiĝvilaĝon, Mladen fariĝas pilastro de l'junulara kooperativa grupo, en kiu oni faris referaĵojn, aranĝis teatrajn spektaklojn kun progresema temaro, junulajn amuzvesperojn. Sub lia gvidado la kooperativa grupo fariĝis plej bona helpanto de RMS. En Steĵerovo li organizis ankaŭ kurson de Esperanto kaj mem gvidis ĝin.

En la najbara vilaĝo Bâlgarene, kie mi estis instruisto, ankaŭ funkciis E-grupo. Ni ofte gastis al la kamaradoj en Steĵerovo. Mladen jam gajnis sola sian panon. Samtempe estis ŝarĝita per multa laboro en RMS. Malgraŭ tio li ĉiam trovis tempon ne nur renkonti nin gaste en sia vilaĝo, sed ankaŭ veni ofte en Bâlgarene, viziti la aranĝojn de nia E-grupo. De li ni rice-

vadis la sekretan esperantlingvan bul-tonon pri la civitana milito en Hispanio (1936); li liveris al ni ankaŭ la lernolibron kaj la poŝvortarojn de Asen Grigorov kaj diversan progreseman literaturon.

En tiu tempo Mladen jam estis sekretario de RMS en la regiono de Steĵerovo. Dank' al lia energia kaj prudenta laboro la organizaĵoj de RMS ĉe ni evidente aktiviĝis kaj kreskis laŭ nombro kaj membraro.

Post la militista puĉo de 1934 j. Mladen fariĝis gvida funkciulo de la Partio. Li vizitis ĉiujn sekretajn kunvenojn kaj konferencojn, organizitajn de la regiona komitato de BKP. En tiuj kunvenoj ordinare li parolis la lasta, ne multe, sed firme, prudente kaj konvinke.

Pro liaj politikaj ideoj kaj agado, en la kazerno li estis akceptita kiel laborsoldato. Ankaŭ ĉi tie li agis aktive inter siaj kamaradoj, plialtigis ilian kulturan kaj politikan nivelon, varbis adeptojn de RMS kaj BKP. Lia kamaradeco kaj sincereco rapide gajnis la

(daŭrigo sur p. 13)



ANDREJ JORDANOV NENOV

Antaŭ dudek kvin jaroj heroe pereis por la libero de nia popolo la bona kamarado kaj esperantisto Andrej Jordanov Nenov.



Andrej naskiĝis en 1914 en la malgranda vilaĝo Pejĉinovo, apud urbo Bjala, distrikto de Ruse.

La trian klason de la progimanzio li finis en mia vilaĝo Polsko Kosovo en 1928/29 j. Tiam ni fariĝis bonaj amikoj kun Andro. Li estis modesta, kvietta, sed saĝa kaj laborema junulo.

Estante duonorfo (sen patro), li ne povis studi gimnazion kaj finis praktikan agrikulturan lernejon en la najbara v. Strahilovo. Poste li estis novico en la akvomuelejo de Djakovci en v. Dolna Studena, regiono de Bjala.

Kiel nova instruisto, en 1927 j. mi ricevis oficlokon en Pejĉinovo. Mia ĝojo estis granda, ke mi denove vidos mian bonan amikon Andro.

Tiam li laboris kiel magazinisto ĉe la kooperativo en sia vilaĝo. Tage li

laboris multe en la magazeno, ankaŭ helpis sian patrinon en la kamplaboro, sed malgraŭ tio vespere ĉiam li estis en la popola legejo. Tie li trarigardis la gazetaron, aŭskultis muzikon kaj novaĵojn de la ununura radioaparato en la vilaĝo.

En 1938 li komencis lerni Esperanton. Mi donis al li la lernolibron de Asen Grigorov. Kune kun li lernis la Internacian Lingvon ankoraŭ dek gejunuloj de vilaĝo Pejĉinovo kaj Polsko Kosovo.

Dum la vintro, nokte, ni malŝlosis la legejon kaj aŭskultis sekrete „La Internacion“ de Radio Moskvo. Poste ni muzikis ĝin kune, mi — per violono, li — per citro. Andro estis abstinulo kaj aktiva membro de la legejo. Li ĉiam partoprenis la vesperamuzojn en la legejo kaj estis amata de ĉiuj — junaj kaj maljunaj.

En 1940 mi translokiĝis en alian vilaĝon. Tiam Andro malfermis propran magazinon „Bratski Trud“ („Frata Laboro“).

Dum la faŝisma periodo 1941—1944 li kolektis monon kaj provizaĵojn por partizanoj kaj politikmalliberuloj. Nokte li portis la pezan dorssakon kun fromaĝo al v. Polski Trâmbeŝ, alifoje — kun mielo aŭ butero al v. Bosilkovci.

Unu matenon dum la printempo de 1944 li estis arestita kaj veturigita en v. Pavel. Tie estis la stabo de la ĝendarmaro.

Longtempe oni pridemandis kaj turmentis lin, sed li ne denunciis la partizanojn. Lia volo estis firma. Li restis kuraĝa antaŭ la morto!

Je la 21-a de junio 1944 Andrej estis mortpafita kune kun aliaj kunhelpanoj de partizanoj apud v. Pavel, regiono de Sviŝtov.

Andrej pereis por la libero de la popolo.

Jordan Atanasov



INSTRUISTA KONFERENCO EN RUSE

La 20-an de aprilo en Ruse okazis instruista konferenco, organizita laŭ iniciato de la Instruista Sekcio ĉe Bulgara E-Asocio. Partoprenis 26 geinstruistoj el tri distriktoj: Ruse, Razgrad, Silistra. Ĉeestis ankaŭ grupo de lernantoj, kiuj lernas Esperanton.

K-do Geto Dobrev, prezidanto de la E-Sekcio ĉe la Domo de la Instruisto en Ruse, malfermis la konferencon kaj klarigis ĝiajn taskojn.

Salutojn prezentis d-ro Zafhari Boĉev — en la nomo de CK de BEA, kaj Boris Kavalĝiev — en la nomo de la esperantistoj-veteranoj en Ruse.

Sukcesplenan modelan lecionon faris la instruisto Ivan Bajĉev el Ruse (kun la ĉeestantaj lernantoj). Sekvis viglaj diskutoj, en kiuj partoprenis Petr Georgiev — instruisto en Isperih, Petr Stojanov — lernejdirektoro en Ruse, Ivan Nejĉev — instruisto en Trâstenik, Nejko Radkov — instruisto en v. Dve Mogili, Ĥristo Dimitrov — instruisto en Kubrat.

Sekvis raporto de k-do Geto Dobrev pri la E-Movado inter la instruistoj en la distrikto de Ruse. Laŭ lia raporto 66 geinstruistoj ĉi tie estas pretaj instrui la lingvon en lernejoj. Li pritaksis kiel laŭdindan la laboron de la instruistoj Ĥristo Kalĉev en Bjala, Petr Genov en Dve Mogili, Maria Koseva kaj Inav Bajĉev en Ruse k. a.

La konferenco aprobis decidojn pri aktivigo de la E-instruado en la lernejoj. Ĝia laboro estis alte taksita de ĉiuj.

D-ro Z. B.

LA ESPERANTO-MOVADO EN DISTRIKTO DE SMOLJAN SUPRENIRAS

La 28-an de marto en Smoljan okazis la jara distrikta konferenco de BEA. Raporton pri la agado faris la prezidanto de DK k-do Jordan Jordanov. Li notis, ke la E-Movado en la distrikto marŝas unisone kun la akcelita disvolviĝo de nia Patrolando, kun ĝia konstante kreskanta aŭtoritato en eksterlando. Ĉefa tasko antaŭ la esperantistoj en la distrikto estis disvastigo de Esperanto. Notinda sukceso tiurilate estis la organizado de la unuaj en nia lando Internaciaj Kursoj de Esperanto en 1968. La tri grupojn partoprenis poloj, hungaroj, jugoslavoj, francoj, bulgaroj, kiuj samtempe lernis kaj ripozis en la ĉarma Rodopi-Montaro. El la distrikto de Smoljan partoprenis la kursojn 18 personoj, 5 el kiuj ricevis diplomojn pri instru-rajto de Esperanto. Krom la Internaciaj E-kursoj, en la distrikto ĉe la E-societoj estis organizitaj pluraj E-kursoj por komencantoj en la urboj Smoljan, Madan, Rudozem, Zlatograd, en la vilaĝoj Nedelino, Batanci, Borieva k. a. kun kursgvidantoj Emil Ĉirpanski, Vanja Pavlova, Ivan Karaminev, Blaga Despotova, Mustafa Mustafov, Asen Solakov, Nikolaj Gjurnev k. a. Bonaj sukcesoj estas ankaŭ en la internacia E-korespondado: el la distrikto oni jam kreis ligojn kun E-societoj kaj unuopaj esperantistoj el Pollando, USSR, Hungario, Jugoslavio, Francio, Japanio ktp. Bone efikas la ĉiujaraj junularaj E-baloj en Madan, la regule prizorgataj E-vitrinoj en la diversaj loĝlokoj, la oftaj ekskursetoj al pitoreskaj lokoj, la intersocietaj renkontiĝoj, la kolektiva festado ĉe naskiĝtagoj.

Antaŭstaras la tasko bone organizi la Duajn Internaciajn E-kursojn ĉi-somere en urbo Smoljan kaj en montodomo „Studenec“-Pamporovo


(daŭrigo sur p. 14)

senrezervan fidelecon de la soldatoj ne nur el lia rotparto, sed ankaŭ el la tuta roto. Malamis lin nur la faŝistoj. Pro lia progresema agado li ofte estis punata, batata kaj enkarcerigata tute malbone vestita — nur en mallonga, eluzita soldatmantelo.

La konstanta malriĉeco, la arestoj kaj enkarcerigoj subfosis definitive lian sanon kaj li eliris el la kazerno tute malsana. La klopodoj de lia familio kaj kamaradoj restarigi lian sanon restis vanaj. La hospitala administracio en Sviŝtov interkonsente kun la polico finmortigis lin.

Kiam mi vizitis lin en la hospitalo, li multe interesiĝis, kiel laboras la remsanoj, la esperantistoj. Liaj lastaj paroloj estis: „Fratoj miaj, laboru pli sisteme, pli prudente, pli laŭplane. . .“ — kaj li svenis. La bonega junulo forpasis la 3-an de junio 1938 j. Malgraŭ la malpermeso de la polico ĉe lia enterigo kolektiĝis ĉirkaŭ 2000 homoj — junaj kaj maljunaj, partiaj kaj senpartiaj, liaj amikoj kaj ŝatantoj el Steĵerovo kaj el dekoj da ĉirkaŭaj vilaĝoj. Ili ĵuris antaŭ la freŝa tombo sekvi la helan ekzemplon de Mladen Blaĵev.

Prokopi Dragolov



Gaste en Stojanovo

ESPERANTO KONKERAS NOVAJN TERENOJN EN NIAJ VILAĜOJ

v. Novo Selo, distrikto de Ruse. La 11-an de oktobro 1968 en la vilaĝo estis fondita E-societo „D-ro L. L. Zamenhof“ kun 27 membroj, el kiuj 14 gelernantoj. Prezidanto Georgi Georgiev — instruisto, kaj sekretario Stojan S. Georgiev.

v. Gjuŝeŝevo, distr. de Kjustendil. La 10-an de februaro j. k., post la finiĝo de E-kurso, en la vilaĝo okazis fonda kunveno de E-Societo „Ruen“ kun 20 membroj — instruistoj kaj oficistoj. Kiel prezidanto estis elektita Mihail Kokalinski — instruisto. Antaŭ la fonda kunveno parolis pri la lingvo Esperanto kaj la taskoj de la nova societo Georgi Kaŝukeev — prezidanto de DK de BEA.

v. Ĵitnica, distr. de Tolbuhin. Nova E-stelo ekbrilis en ora Dobruĝa — en v. Ĵitnica. Ĝi ricevis la nomon „Ora Spiko“ kaj havas 11 membrojn — lernantojn kaj instruistojn. Prezidanto Stanka Koleva — instruistino kaj sekretario Ljubka Ilieva — instruistino.

v. Ĵilinci, distr. de Kjustendil. Rezulte de kurso, gvidita de Atanas Gargurov, en v. Ĵilinci naskiĝis novaj esperantistoj — lernantoj kaj instruistoj. La 17-an de marto j. k. ili fondis E-societon, kiu ricevis la nomon „Dimitr Kaljaŝki“ — la nomon de la elstara batalinto kontraŭ faŝismo kaj aktiva esperantisto D. Kaljaŝki el la sama vilaĝo, kiu pereis heroe en la batalo. En la nova societo membras 27 gelernantoj kaj geïnstruistoj. Prezidanto Ĥristo Kotev — instruisto kaj sekretario Rosica Ivanova — lernantino.

Ni bondeziras sukcesojn al la novaj E-fajrujoj en niaj vilaĝoj!

ESPERANTO- RONDO EN BORISLAV

Inter la distriktoj de Pleven kaj Loveĉ troviĝas la malgranda vilaĝeto Borislav, fama pro la multaj partizanhelpantoj kaj kaŝantoj dum la kontraŭfaŝisma batalo.

Ekde la pasinta jaro ni, junaj gelernantoj, ekdeziris variigi nian vivon kaj pli inde renkonti la 25-an jubileon de la Socialisma Revolucio en Bulgario. Ni decidis organizi rondeton por ellerni la Internacian Lingvon Esperanto, pri kiu ni tiom multe jam aŭskultis. Forte efikis nin la penso de Georgi Bakalov: „La facileco de Esperanto faras ĝin ellernebla eĉ por plej vastaj popolamasoj.“

Nian rondeton ekgvidis la instruisto Georgi Caĉev — sindona kaj entuziasma esperantisto. Komence la gekursanoj timis, sed iom post iom ili fariĝis pli kuraĝaj, ĉiu leciono — pli interesa kaj gaja. Oni aranĝis malgrandajn ekskursetojn, kolektivajn vizitojn de teatro, kino k. s. Neforgesebla restos por ni la renkontiĝo kun geesperantistoj el vilaĝo Stojanovo, distrikto de Loveĉ.

La junaj geesperantistoj jam salutas sin surstrate en Esperanto, interparolas en tiu nova lingvo, komencis korespondadon kun eksterlando. La intereso al la E-Movado kreskas ĉiam pli kaj pli.

Mitka Coneva

Antaŭstaras ankaŭ la solena inaŭguro de monumento de nia glora heroo el la kontraŭfaŝisma batalo kolonelo Diĉo Petrov — la legenda komandanto de la soldala partizana bataliono „Ĥristo Botev“, kiu eĉ en la landlima postenejo instruis Esperanton al la soldatoj. Ĉi tiu inaŭguro transformiĝos en granda esperantista solenaĵo. Laŭ decido de CK de Bulgara E-Asocio, en montodomo „Studenec“ estos samtempe organizita internacia simpozio je temo „25 jarojn socialisma Bulgario“.

Multaj aliaj taskoj staras antaŭ la esperantistoj en distrikto de Smoljan, sed ili kredas ilin solvi sukcese, ĉar ĉiuj estas plenaj je entuziasmo kaj sindonemo por nia kara E-afero, por la prospero de nia amata Patrolando, por la internacia amikeco kaj paco. En tiu nobla agado ili ne estas solaj: ilin subtenas kaj helpas la DK de Bulgara Komunista Partio, la Distrikta Popola Soveto, la estraroj de la aliaj amasaj organizaĵoj en la distrikto.

Maria Diĉeva

Fervojista Esperanto-Rondo en GDR organizos leteresperon. Ĝi petas alsendon de leteroj, bk ĝis la 1-a de oktobro 1969. Ĉi sendinto ricevos respondon per ilustrita esperantlingva libro „GDR sin prezentas“. Adreso: Fervojista Esperanto-Rondo, RAW, 727 Delitzsch, GDR.



SUKCESE FINITA E-LERNOJARO

Jam kvaran jaron junaj estontaj kamparmastrumaj laboruloj — gelernantoj el la Maŝin-Traktara Lernejo „Georgi Dimitrov“ — Ĉirpan, diligente lernas Esperanton. Dank' al la pozitiva rilato de la lerneja estraro la kursaroj havis ĉiujn favorajn eblojn dufoje en semajno sin ckupi kaj ekposedi la Internacian Lingvon. La sindona al nia E-movado k-do Taŝko Georgiev, teknikisto kaj instruisto, estis tre sperta en la E-instruado. Liaj gekursanoj libervole kaj kun intereso vizitadis la lecionojn. La kurso finiĝis per modesta solenaĵo. kiun ĉeestis la tuta estraro de la loka E-societo. Petr Šparov, prezidanto de la societo, disdonis la diplomojn kaj ornamis la refaldojn per la E-insigno. Fine oni deklamis kaj kantis Esperante.



Simeonka Miteva

La gekursanoj en Ĉirpan

LETERO EL KIEV

Nia s-no Kiril Velkov, kiu nun estas aspiranto en la Politeknika Instituto „Lenin“ — Kiev, skribis al la estraro de la E-Societo „Maksim Gorkij“ en Sofio, kies membro-estrararo li estis antaŭ unu jaro:

Estimataj gesamideanoj,

Pardonu min, ĉar pro multaj kaŭzoj mi ĝis nun ne skribis al vi leteron. Miaj personaj aferoj estas en normala stato. Sed verŝajne multe pli interese por vi estus ricevi informon pri la Esperanto-agado en Kiev. Lastatempe ĉi tie la Movado havas sufiĉe grandan prosperon. La pasintan printempon ĉe la Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando oni kreis Komisionon por Akordigo de la Agado de Ukrainiaj Esperantistoj. Tiu Komisiono komencis eldoni presbultenon „Tra Soveta Ukrainio“, kies unuajn numerojn vi jam verŝajne vidis kaj legis. Estas planita ankaŭ eldonado de artaj verkoj de ukrainaj verkistoj — antologio de la ukraina literaturo kaj elektitaj versaĵoj de Taras Ŝevĉenko. Ambaŭ librojn devas aperigi la eldonejo „Mistectvo“ („Arto“).

En nia Instituto ankaŭ estas vigla E-agado. Kiel plej freŝa evento povas esti indikita la hieraŭa disaŭdigo de la instituta radio pri kaj en Esperanto. En la kadroj de la programo estis plenumitaj estradaj kantoj, estis tralegitaj la vortoj de M. Gorkij pri Esperanto kaj kelkaj informoj pri la agado de nia E-Klubo.

La impresoj de ĉiuj studentoj, aŭskultintaj la programon, estas bonegaj. Nia Klubo, kiu ekzistas ĉe la komitato de Komsomolo, antaŭnelonge organizis propagandan kunvenon en la Instituto. La studentoj, dezirantaj lerni Esperanton, estis tiom, ke ni devis organizi tri kursojn por komencantoj, kiuj donos post unu monato novan anaron. Niaj geklubanoj aktive partoprenas en la preparo de materialoj por „Tra Soveta Ukrainio“, kompilas sciencajn artikolojn kaj prelegojn. Vintre unu el niaj malnovaj membroj defendis sian diplomon kun resumo en Esperanto. Niaj studentoj nun gvidas ĉiujn E-kursojn en la urbo. Preskaŭ ĉiun dimanĉon ni organizas ekskursojn tra la urbo, vizitas muzeojn ktp. Kiam venos la printempo, ni ekskursos ankaŭ ekster la urbo. Somere estos vizitoj de Esperanto-tendaroj.

Por fari la kluban agadon pli interesa kaj samtempe efektivi rilatojn kun la neesperantistoj, ni planas inviti interesajn homojn — verkistojn, sciencistojn ktp., kiuj prelegos antaŭ ni.

Nia Klubo fariĝis ankaŭ Junulara Sekcio ĉe la Esperanto-Komisiono.

Tio estas la plej interesaj faktoj pri nia agado. Ĉe ni estas ankoraŭ multaj ideoj kaj planoj. Ni havos propran insignon, membrokarton.

Do, fine ĉiuj sofiaj geesperantistoj akceptu korajn salutojn, sincerajn bondezirojn. Persone mi salutas la prezidanton Nano Nanov kaj la tutan estraron de Esperanto-Societo „Maksim Gorkij“.

K. Velkov

LA DORSSAKETO DE BRANKO

Rakonto de Ljudmila Paspaleeva

Al la lernanto Branko Popov
el v. Lesnovo, distrikto de
Sofio, mortpafita de la faŝistoj
sur Golo Bârdo

Ja mi estas simpla kanaba dorssaketo — neniue atentis min. Enirinte en la hejmon de Branko, la faŝistoj unue kaptis la ĉasfusilon. Kaj ĉion, kio estis bela, kompreneble. Ili traserĉis la domon kaj foriris. Al mi eĉ rigardon ne ĵetis. Mi ankaŭ nun pendas tie, apud la fajrujo, kie lasadis min Branko.

Nur la panjo de Branko ekrigardas min kelkiam kaj la angoro ekŝprucas en siaj okuloj.

— Kial vi, Branko, ne estas viva por surĵeti la saketon sur la dorson kaj iri al ĉasado! — ŝi veas ĉirkaŭ la fajrujo, kaj siaj larmoj estingas la karbardaĵon.

Ke ili iomete estingu ankaŭ ŝian suferon — pensas mi. La kompatinda! Ŝi eĉ nun ne scias, ke ŝia filo ne ŝatis la ĉasadon. Tio estis nia sekreto. Nur ni triope ĝin sciis: Branko, Ŝaro¹ kaj mi. Ili delonge ne ekzistas. Jam dudek kvin jarojn. Kaj mi ĝis nun ruĝiĝas pro la mensogo. Sed neniue komprenas tion — kvazaŭ la ruĝiĝo estas pro la fajro aŭ pro la suno, kiu brilas kontraŭ mi. Aŭ pro la puncaj borderstrioj sur mi. Vi, panjo, teksis ilin kun tiom da amo, sed mi, mi kaŝis ĉion de vi...

Sed ĉu mi povis agi alimaniere? Ja vi malamus min, vi disigus min de Branko. La patrinoj timas la danĝerajn kamaradojn de siaj filoj.

Kaj mi estis danĝera kamarado.

Vere, ni preskaŭ ĉiutage iris al ĉasado. Surmetas min Branko sur sian dorson, kaptas la ĉasfusilon, surmetas

ankaŭ sian lernantjakon — kaj al la monto.

Ĉiuj opiniis, ke Branko havas someran ferion. Sed ni silentis, kiel ni silentis ankaŭ pri la alio.

Du tagojn antaŭ ol fini la lernojaron, Branko estis forigita, ĉar en mi kune kun la lernolibroj li kaŝis sekretajn alvokojn. Jen tiajn — malgrandajn folietojn, skribitajn mane per presliteroj. Malgrandaj, sed danĝeraj: ili vokis al mortbatalo kontraŭ la faŝistoj! Diablo sciis, kial oni ankoraŭ ne estis komunikintaj pri Branko el la polico de Sofio.

Eĉ Ŝaro nenion sciis. Al ĉaso li venis ĉiam kun ni, sed kuris antaŭe — pro ĝojo kaj malpacienco.

La monto nin renkontis ĉiam kiel karajn, atenditajn gastojn. . . Ĉirkaŭ ni preterkuras timigitaj leporetoj, aŭdiĝas tetraoj. Branko streĉe aŭskultas kaj rigardas post la longorelaj bestetoj eĉ ne tuŝante la fusilon. Ŝaro opinias, ke li preterlasis vidi ilin, kaj bojas insiste por atentigi lin.

Ni eniras la densejon. El la frambarbustoj eliras barbokovrita junulo kun aŭtomatfusilo en la mano. Li kaj Branko interŝanĝas kelkajn vortojn, Branko donas al li tion, kion mi portas: iajn skribitajn paperetojn, kuracilojn, bandaĝojn.

Alifoje — pakaĵojn, kies enhavo ne estas videbla.

Ŝaro sentas, ke ni estas amikoj, tial li ne maltrankvilas kaj ne bojas, sed rapidas manĝeti iun frambon. Mi staras ĉe Branko, proksime de lia koro. Dum ni iradis, ĝi batis iel maltrankvile kaj

¹ Ŝaro — ofta nomo de virhundo, kiu signifas „bunta hundo“.



senpacience. Ĉi tie ĝiaj batoj tuj fariĝas pli trankvilaj, pli certaj.

Branko kaj la junulo longe interparolas — mallaŭte, arde. Pri kio — mi ne aŭdas. Mi nur komprenas, ke ili parolas pri io grava.

Ni ekiras returne, kaj mia servo ŝanĝiĝas. Preter ni denove kuras por savi sin timigitaj leporetoj. Denove aŭdiĝas tetraoj.

— Mi domaĝas ilin! — ofte manŝvingas Branko.

Iufoje kapreolo elsaltas sur la vojeton — malgranda, tute eta, kun brunaj, humidaj okuletoj. . . Se Branko pafus, li trafus ĝin. Sed li nur pensas parole:

— Ankaŭ ci kiel ni kaŝas cin, streĉas la orelojn. . .

Alifoje kun ĝemsopiro li celas iun leporeton.

— Pardonu, amiko! — diras Branko. — Ne eblas alimaniere. Ĉiutage kun malplena sako — suspektinda afero. . . La maljunuloj tuj ekdeziros vidi, kion mi trafis.

Jes, post sunsubiro la maljunuloj kvazaŭ intence eksidas antaŭ la pordegoj por atendi nin. Kiam ni aperas, ili de malproksime demandas, ŝercas. Kaj kiam ni proksimiĝas, ili enrigardas la sakon por vidi la ĉasaĵon. Jen laŭdas Brankon, jen mokas, ke li nenion estas trafinta. Kaj Branko, kaj mi estas gajaj, ke la maljunuloj ne konjektas pri nia sekreto. La sekvan tagon Branko

denove devas pafi leporeton malgraŭ sia kompatema koro. . . Kia ĉasisto li estis, se li domaĝis la ĉasbestojn?

Sed la sekreton mi jam povas diri. La barbiĝinta junulo kaj la aliaj kamaradoj de Branko delonge venkis. Dudek kvin jarojn, de kiam la partizanoj mal-supreniĝis el la monto. Jam mi deziras rakonti, rakonti pri ili. Sed kiu aŭdos min, la simplan kanabsaketon, kiu ne povas paroli. Eble nur vi, panjo?

Mi kaj Ŝaro amis vian filon. Ĉu vi memoras, kiel li ekbojis kontraŭ la ĝendarmoj? Ili venis el la urbo por aresti Brankon. Ŝaro ĵetis sin kontraŭ ilin, defendis Brankon. Li mordis unu ĝendarmon kaj tiu mortpafis lin.

Nek Ŝaro, nek mi similis la homon, kiu denunciis Brankon. Tiu povis paroli. . .

Sed Branko silentis. Oni lin turmentis — li eĉ vorton ne diris.

Ni atendis lin — tage kaj nokte. Se la pordo ekgrincis, la maljunulino ek-tremis kaj fiksas ridardon. Kvazaŭ nun revenos ŝia Branko, ekridetos. . .

Sed li jam ne trapaŝis la sojlon. Post monato aŭ pli oni aŭdis: Branko estas mortigita kune kun multaj kamaradoj tie, supre, en la monto, kie kolektiĝas la ventoj.

Li eĉ antaŭ la morto ne ektimis, vorteton eĉ ne diris. . .

Kaj ankaŭ mi, kiel li, konservis la sekreton.

Mi estis danĝera, sed fidela kamarado.

Ĉefredaktoro: Kunĉo VALEV

Redakta Komitato: Tatjana EVSTRATIEVA, Atanas LAKOV, Venelin MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV, Petr TODOROV.

Korektis: Iv. Sarafov

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

Nia Poŝto

A. Laĉev — Svilengrad: Vi ne rajtas distranĉi verkon, traduki nur parteton el ĝi, kiu plaĉas al vi, kaj klopodi pri ties publikigo. Des pli ĉe malgranda versaĵo kiel „Papilioj“. Vi faris ankaŭ seriozajn gramatikajn erarojn: „Ke scias ankaŭ ĝi (anst. ili); „kovriĝi la vundoj sangaj de la ĉiuj landoj“ (anst. kovri la vundojn sangajn de ĉiuj landoj) k. a. Laboru! Persistu!

L. Leviĉarov — Sofio: Bone vi raportas pri la Filatela E-Ekspozicio en Sofio (16—22 de februaro) sed tro malfrue vi sendis la materialon. Dume ni utiligis alian, eble ne tiel bonan.

Sl. Ŝijakov — Tolbuhin: Vi havis bonan intencon: verki rememoron pri la Patrolanda Milito de nia popolo kontraŭ faŝisma Germanio (1944—1945), kiu eduku en spirito de patriotismo, de malamo al faŝismo kaj militarismo, sed, bedaŭrinde, vi ne sukcesis. En la centro e via rememoro staras epizodo de si mem interesa, sed tute ne heroeca kaj ne efika. Rakontu alian epizodon, uzante la enkondukajn vortojn. Kaj—atentu pli multe pri via lingvo, stilo, gramatika korekteco!

G. Simeonov — Vidin: Vian artikolon „Esperanto — lingva ŝlosilo“ ni utiligos.

ESPERANTO—GEEDZIĜOJ

Robert Lloancy kaj Marie-Therese Juchault' Adrian Boldan kaj Elena Balanescu, Jordan Kazakov kaj Lina Ilieva — jen la lastatempa pruvo, ke la Esperanto-junularo bone liveras la kondiĉojn por dumviva feliĉo. Robert Lloancy, kiu edziĝis en Agen, Francio, la 9-an de aprilo, estas estrarano de TEJO kaj redaktoro de „La Juna Vivo“; lia edzino estas prezidantino de la franca sekcio de STELO (esperantistaj studentoj). Adrian Boldan estas ekssekretario de STELO, kaj la edzino estas konata Esperanto-kongresanino. Ili geedziĝis en Bukureŝto la 15-an de februaro. Jordan Kazakov kiu edziĝis en januaro, estas iama prezidanto de STELO, kaj la edzino ankaŭ parolas Esperanton.

TEJO-novaĵoj, № 8/1969

NOVA INTERNACIA E-RIPOZEJO

La E-Societo en Ljubljana preparis ripozejon en Volparija, kiu situas sur la okcidenta marbordo de la duoninsulo Istrio kaj nomiĝas INTERNACIA ESPERANTA FERIO—CENTRO (IEFC).

IEFC disponas tri vilaojn kun entute 150 litoj en 2—3-litaj ĉambroj.

Kompleta pensio kostas de 2,60 ĝis 3,60 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro po tage.

Adreso: IEFC de Esperanto-Societo en Ljubljana, poŝtfako 401, Jugoslavio.

La 28-an de aprilo forpasis en Ŝumen, 79 — jara

IVAN STOJANOV KASABOV

Esperantisto de 1907, Kasabov dum sia tuta vivo estis aktiva membro de E-Societo „Vekiĝo“, kiu lin proklamis honora membro.

Niajn kondolencojn!

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Radostinka Daĉeva Toneva 9-jara), str. Donju Pehlivanov 61-a, Stara Zagora, deziras korespondi kun ĉl.

Ĉeĥoslovakio

S-ro Konstantin Mikuliš. Malacky 329, Slovakio, interŝanĝas uzitajn pm en filatele afrankitaj leteroj.

Vládà Hasala, V. K. Neumanna 37, Hodonin, dez. kor. kun tm.

Francio

Franca filatelisto serĉas malnovajn francajn pm, sendas ĉiujn novajn pm. Korespondas france, angle, germane kaj Esperante. Skribu al: Delaguaize — 52, rue Gandillet, 78, Carrières sur Seine.

Nov-Zelando

New Zeland Esperantist, Recenza Fako, havas novan adreson: 176 Cambridge Terrace, Lower Hutt.

Italio

Daniele Giachetti, Via G. Marradi 19, Firenze.

Multnombraj studentoj de Popola Universitato deziras kor. Adreso: Esperanto, Casella Postale n. 23, I — 91100, Trapani.

Pollando

Regina Rasmus, 19-jara, lernantino, Wielki Komorski, pow. Swiecie n/w, woj. Bydgoszcz — pri muziko, filmoj, fotografio, lingvoj, junularaj problemoj, turismo.